

La Esperanto-Gironde Informilo



JANUARO 2022

N° 166

En vintra ĝardeno



ESPERANTO-GIRONDE
ĜENERALA ASEMBLEO
en CENON PALMER
la 14an de NOVEMBRO 2021
je la 10a 30



Ceestas: Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Lucienne Laroche, Klodin' Pomiroł, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie.

Senkulpigitaj: Jean-Seb Brilleaud (rajtigilo al Elvezio Canonica), Christiane kaj Michel Jagueneau, Gloria Gargallo, Joël Lajus, Morine Stride, Bernard Vidal.

Elvezio salutas ĉiujn, ĝojante pri retrovo post tiom da monatoj.

1. Agad-raporto (Janine)

La antaŭa Ĝenerala asembleo okazis la 5an de oktobro 2019.

• **LEGI:** De tiam aperis 6 numeroj de LEGI (160-165).

• **Okazaĵoj:**

en 2019:

- Renkonto kun Claude Rouget la 1an de decembro
- Zamenhof-tago en St-Germain du Puch la 15an de decembro

en 2020:

- Kunveno en Palmer la 12an de januaro
- Festo por la centjariĝo de Germaine Gatard la 22an de januaro
- Kunveno en Pessac, ĉe Jean-Seb kaj Annie, la 9an de februaro
- Kunveno en Palmer la 8an de marto

en 2021:

- Estrarkunveno en Cambes, ĉe Marcelo kaj Klodin' la 24an de januaro
- Estrarkunveno en Cambes, ĉe Marcelo kaj Klodin' la 28an de februaro

• **Projektoj kaj plenumitaĵoj en la jaroj 2019-2021:**

- Estis propono por esperantigi la tekston de la ekstera voĉo de ĉina filmo de Zhao Liang (vd en LEGI 163). La teksto estis tradukita al Esperanto, la voĉoj de Yannick kaj Bernard S. estis provregistritaj en septembro-oktobro 2019. Poste neniu novaĵo. Antaŭ nelonge Yannick malkovris, ke la filmo finfine ekzistas sub la titolo *l'm so sorry*, kaj eĉ estis prezentita okaze de la Festival de Cannes 2021. Neniu aludo pri Esperanto-versio.



- Plipreciziĝis kaj finfine realiĝis la projekto pri la kantaro entenanta 66 esperantigitajn kanzonojn de Brassens. (vd LEGI 165)

- Alvenis propono esperantigi la tekstojn de la dokumentfilmo *Les Damnés de la Commune*, de Raphaël Meyssan, por la SAT-Kongreso 2021. La laboro estis kiel eble plej rapide plenumita kaj la rezulto estas plej kontentiga. (vd.LEGI 165).



La agadraporto estas unuanime aprobita.

2. Financa raporto (Martine)

La kaso enhavas ĉirkaŭ 5000 €-ojn, el kiuj 3000 € sur A-Libreto.

La 31an de oktobro 2021 estis 2102,49 € sur la bankokonto.

Sekve de perreta voĉdono la aliĝkosto ekde 2022 iĝas po 20 € por individuo kaj po 27 € por paro.

La printado de LEGI kostis tro da mono, sed de du numeroj printas la ekemplerojn la sindikato SUD, por helpi al la asocio. Plie la sendokostoj malpliigas (malpli da ekzempleroj sendendaj).

Asekureco: 120 €

Retejo: ĉirkaŭ 50 € /jare

Estis ricevitaj 600 € por la aliĝoj al la Kompanoj (kaj la kantaro).

Subvencioj:

1000 € de Serge Sire por la printado de la kantaro

300 € de la reĝisoro de la ĉina filmo

324 € (poŝtmarkoj) de la sindikato SUD

La departemento donacas al la sindikatoj poŝtmarkojn por la elektokampanjoj, sed tiuj nun okazas ĉefe per la reto, do restas multaj poŝtmarkoj, kiujn la sindikatoj povas libere uzi.

Ĉiu sendo de la kantaro necesigas 8 poŝtmarkojn.

La kantaro: kostoj: Desegnoj kaj frontpaĝo: 1500 €

Presado: ĉirkaŭ 500 €

Ekzistas speciala tarifo por sendi francajn librojn eksterlanden: 2,87 €. Tiun tarifon ni uzis por sendi la libron al Luksemburgo.

Marcelo: Oni devas vendi 35 librojn de la 2a eldono por kompensi la printkoston. Jam alvenis tre pozitivaj opinioj pri la venditaj libroj el SAT-Amikaro en Parizo, Araso, Lillo kaj Le Mans.

La lilla grupo petas, ke iu venu prezenti la libron en Lillo la 12an de decembro.

Bretonia grupo mendis 10-on da ekzempleroj.

En Tuluzo, Marcelo prezentos la libron okaze de Eo-festo la 5an de decembro.

Estas ankaŭ mendoj el Limoĝo.

En majo 2022, okaze de la UFE-kongreso (26a-29a de majo) en Trelissac, Marcelo prezentos la libron. Male, neniu respondo el la grupo de Montpellier.

La financa raporto estas unuanime aprobita

3. Projektoj

(1) Forpelo el Palmer

Marcelo kaj Klodin' jam informis nin pri la baldaŭa fermo de la kultur-centro en Cenon-Palmer.

La tieaj asocioj devos trovi alian lokon. La municipo disponigos al ili la Asocian Domon, kie povos okazi la kursoj (kiuj estas sekcio de la Kultura Centro de Cenon), sed ne estas loko por meti la 4 ŝrankojn kun ties entenoj: vendeblaj libroj, kurso-materialo, biblioteko (libroj, revuoj...), imponega arkivo (depost la kreo de la Bordoza Esperanto



Grupo en la jaroj 1960-aj, eĉ kun dokumentoj el la fino de la 19a jarcento kaj komenco de la 20a jarcento). Du ŝrankoj apartenas al la Kultura Centro (sekcio Esperanto), kaj du al Espéranto-Gironde.

Alia problemo estas, ke la Asocia Domo estas fermita dum semajnfinoj.

Cetere la socia adreso de la asocio devos esti ŝanĝita (ĝis nun, ĝi estas je Palmer).

La asocio estas en la kastelo ekde la malfermo de la Kultura Centro en 1967.

Céline Dotigny, la responsulino pri kulturo de la urba konsilantaro promesis, ke ŝi ne lasos la asocion en malfacilo.

Bernard konas la urbestron de Lormont, Sron Touzeau. Eble la asocio povus translokiĝi al Lormont.

Yannick: Eble Emeline povus konsili nin.

Marcelo: La grupo de Angers antaŭ 4-5 jaroj frontis saman situacion, kaj devis meti la bretojn en garaĝon. En Araso, la grupo disponas pri nur unu kolono en iu ŝranko.

Bernard: Eble la Departementa Arkivejo estus interesata pri la arkivo de Espéranto-Gironde.

(2) En la Universitato

Elvezio: Ne okazis la antaŭvidita prezento de la brasensa kantaro la 9an de novembro, sed ĝi povos okazi poste.

La nombro de studentoj en la Esperanto-kurso draste malpliĝis; ili nun estas kvar aŭ kvin. Unu estas vere interesata. La kolego de la Lingvo-klubo diris, ke Esperanto devas esti lingvo instruata en la universitato, samgrade, kiel la ceteraj. Tio devas esti plenumita ekde septembro 2022. Do Elvezio devas prepari la prezentotekston, la diversajn oficialajn dokumentojn (insisti pri la internaciaj diplomoj). La kurso estos por la tuta universitato (ne nur Montaigne) kaj malfermita al ekstera publiko.

Estos aliĝkosto, kiel por ĉiuj aliaj lingvo-kursoj: 25€ jare. La prezento de la diversaj lingvoj okazos ĉirkaŭ marto.

Marcelo: La aliĝkosto ne devas esti bremsilo. Espéranto-Gironde povas finance partopreni aŭ eĉ pagi la tuton de la aliĝo.

Cetere oni povas informcele uzi la kalendaretojn (meti en la universitatajn restorciojn ktp.)

Elvezio: La Lingvo-festo okazos en marto-aprilo.

Klodin': Andreo alportis kartonojn plenajn de libroj por la universitato.

4. Elekto de la komitato

Ĉiuj membroj de la komitato denove kandidatas.

Ĉiuj estas elektitaj.

Komitato:

BRILLEAUD Jean-Sébastien, CANONICA Elvezio, DUMOULIN Janine, DUSSENTY Monique, EDELBLOUDE Martine.

La elekto de la estraro estas tuj efektivigita.

Okazas neniuj ŝanĝoj:

Prezidanto: CANONICA Elvezio

Kasistino: EDELBLOUDE Martine


Sekretariino: DUMOULIN Janine

La Ĝenerala asembleo estas fermita je la 13a

Gloria alvenas post la tagmanĝo.

Posttagmeze Marcelo prezentas la lumbildaron, kiun li kreis por prezenti la projekton pri Brassens, kaj la etapojn de ĝia efektivigo: la Brasensa Epopeo.

Ĝi estas en formato PowerPoint, por ke ĉiu povu ĝin uzi.





Notinde estas, ke Roger Bernard tradukis la Kanton por la kampul' en la jaroj 1953-1954 (kiun li kantis en la kabaredo La Ruza Kruĉo). Je tiu epoko Brassens ĵus komencis esti iom fama. Verŝajne Esperanto estas la unua lingvo en kiun estis tradukita kanzono de Brassens.

Informo: Hélène Peraire (pranevino de Lucien Péraire, el Lavardac, Lot-et-Garonne, kiu famiĝis en la jaroj 1930-aj, vojaĝinte per biciklo al Vjetnamio, kie li kreis la unuan Esperanto-

kurson), informis, ke la urba konsilantaro decidis ceremonie meti platon sur la naskiĝdomon de Lucien Péraire kaj doni lian nomon al urba skvaro.

La venonta kunveno okazos la **9an de januaro** en Palmer¹.

¹ Pro la san-situacio, la kunveno estas prokrastita ĝis la **30a de januaro** en Palmer.

Janine



LINGVA EKZERCO

Bonvolu traduki la ĉi postan prezidentan frazon: "Les non-vaccinés, j'ai très envie de les emmerder et donc on va continuer de le faire jusqu'au bout. C'est ça la stratégie."

La Cenona Kvaropo proponas al vi:

"Fek! La nevakcinitojn mi tre deziras tedadi kaj do ni daŭrigos tiel agi ĝisfine. Jen la strategio!"

Kaj vi, kiel vi tradukus?

Tiun ekzercon proponis al ni Andreo post legado de ĉi-reta artikolo:

<https://www.lejsl.com/politique/2022/01/05/emmerder-les-non-vaccines-comment-traduire-les-propos-de-macron-la-presse-etrangere-hesite>



la teatra kaj kanta trupo de ESPERANTO-GIRONDE

De pli ol tridek jaroj LA KOMPANOJ kantas kaj kantigas en Esperanto. ESPERANTO-GIRONDE invitas vin kunhelpi al disvastigo de kulturo per Esperanto. Spite al moroziga pandemio, mojosigu vian ĉiutagon dank' al muziko kaj

Kantu en ESPERANTO!

Per la ĉi-kuna kupono ricevu atkvalitan materialon por kunfesti la centjarigon de Brasenso kun LA KOMPANOJ.

ESPERANTO-GIRONDE proponas al vi provi ĝui Brasenson per speciala kantaro kun gitarakordoj kaj originalaj ilustraĵoj de Blaise Guinin, rezervita al La Kompanoj. Dulingva Fr-Eo - Formato 20x21 - 244 paĝoj.



BULTENO resendenda al ESPERANTO-GIRONDE

Ĉe Martine Edelbloude – 2 rue Raymond Lavigne 33100 Bordeaux / mabel1533@laposte.net

- Mi iĝas mem Kompano kaj ricevos la materialon por kunfesti la centjarigon de Brasenso al la ĉi-suba adreso.....: 15,- €
- Mi partoprenas en la sendokostoj per: 5,- €
- Sume:, - €

Mi pagas per kunsendita ĉeko al ESPERANTO GIRONDE

ĝiro al poŝtokonto : Crédit Agricole

IBAN FR76 1330 6000 2523 0858 5669 369

BIC AGRIFRPP833

Persona k. familia nomoj:

Poŝta adreso:

Kodo k. Urbo:

SUKCESA « BRASENSA TURNEO » EN PARIZO KAJ NORDA FRANCIO. 15A – 21A DE OKTOBRO 2021

Vendredon la 15an de oktobro, prezento de prelego «Brasenso en Esperanto» animis la babilrondon en la sidejo de SAT-Amikaro, sur la bulvaro Vincent Auriol, en la 13a distrikto de Parizo. Post la bedaŭrindaj foriroj de Elizabet' Barbay, kiu ĵus gvidis unuagradan kurson kaj de Guy Cavalier, kiu samhore gvidis la ĉiu-semajnan esperantan radioelsendon ĉe Radio Libertaire, kunpartoprenis en la diskuto naŭ personoj. Ravita estis Silĉjo Barrier, tradukinto de multaj el la kanzonoj. Kaj li diris sian fieron partopreni en tiu libroprojekto. La prezento de la bildaro daŭris unu horon, dum kiu interŝanĝoj sekvis demandojn, jen de la animanto, jen de la aŭskultantoj. Inter ili ĉeestis Blaise Guinin, la ilustristo, kiu volonte dediĉis librojn per personaj desegnoj al la akirintoj. Kompreneble ni ankaŭ kunkantis kun registraĵoj de Olivier Tzaut, Ĵak Le Puil kaj Jacques Yvart. Eble ne sufiĉe laŭ kelkaj... Sed la temo povus paroliĝi multe pli longan tempon.

Blaise volonte personigas librojn per spontanaj ilustraĵoj

La morgaŭon en Epinay-sur-Seine kunkantado okazis ankaŭ en la hejmo de la familio Ternant.



Lundon la 18an laŭplane okazis la ĉiu-duonmonata kunveno de la grupo de Araso en la tiea kultur-centro. Tie en ĉeesto de novlernanto la prezento de tempo al tempo estis franclingve tradukita. Kaj la sep grupanoj ĝojis, ke tiu junulo povis tiel tuj mergiĝi en la lingvon okaze de sia unua kurso. Fine ankaŭ li akiris la libron! Ankaŭ dum tiu vespero la etoso estis tre amika kaj Brasenso tre bonvena.

Merkredon la 20an la prezento estis «intima». Ĝin aŭskultis sole Boris Bouchez en sia gastiga hejmo proksime al Lens.



Boris kaj Marcelo sur mineja teramaso apud Lens. Ili ekkonis unu la alian kiel knaboj dum la SAT-kongreso en Lekturo en 1978. Antaŭ pli ol kvardek jaroj! Ekzemplo de Esperanta vivdaŭra amikeco...

Kaj fine ĵaŭdon la 22an en Lillo dum kelkhora atendo de rapidtrajno rekte al Bordoza venis invito de niaj Kompanoj, Brigitte kaj Jean-Pierre Quiquempois, la gepatroj de la giganto Naturamiko, heroo de la 100a UK 2015. En ilia hejmo la prezento ravis ankaŭ Michel-on Dechy, la prezidanton de la loka klubo, kiu invitas al denova prezento de la bildaro okaze de tiea jarfina Zamenhof-festo la 12an de decembro. Ĉu iu Bordozano estos libera kaj pretas jesi al la invito?

Konklude: la libro ĉie dum tiu unua turneo ricevis tre entuziasmajn reagojn de la homoj. Esperantistaj aŭ ne. La grupoj pretis akiri pliajn ekzemplerojn sed la valizo estis vojaĝkomence plenplena kaj jam menditaj libroj aldoniĝis en kroma vojaĝsako. Entute tridek kvin libroj estis disdonitaj al novaj Kompanoj, kiuj volonte kun-kantos Brasensan kanzonojn en Esperanto! Triono de la stoko!

Marcelo

NIAJ KURSOJ

BONVOLU ATENTI PRI TIO, KE POVAS OKAZI MODIFOJ PRO LA NUNA EPIDEMIO. PREFERE TELEFONU POR KONI LA KONDIĈOJN DE LA KUNVENOJ.

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attenatant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), et une fois par semaine au collège. Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46). **La kursoj estas portempe neokazantaj.**
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

EPOSA RAKONTO PRI LA BRASENSA PROJEKTO

Teksto kaj ilustraĵoj de Serge Sire
(daŭrigo)



04


Sendiĝis al konataj kanzonaj fam-fakuloj pri la traktado takta de tekstoj laŭ mezuro alvoko por kontrolo, fajlad' aŭ kompletigo de provoj aŭ versioj ne taŭgaj laŭ muziko. Sufiĉe multaj homoj favoris la alvokon eĉ kun titoloj pliaj por nutri l' katalogon. L' projekto ampleksiĝis, kaj ankaŭ la teamo, debatoj tuj stariĝis pri indo de formuloj, ja viglaj kaj riĉigaj, sed kun pli da kvar uloj nur dum la fama tago de sankta Neniamo!

Pluralo ne valoras al homo, kaj tuj kiam kvarope oni plias, jen kretenaro tiam!

(«Le pluriel» ne ene de l' kantaro)

05

Ja viglis la debatoj: se nepras la respekto de la silaba nombro, de taktoj laŭ akcentoj, por esti plenkantebla laŭ celo de l' projekto, plej ofte tute mankas raciaj argumentoj por la decido: kion favori en problemoj kutimaj en traduko, krom laŭ personaj emoj... Ĵanin' en artikolo ĉe l' enkonduka parto «Kompara tekstostudo» ĝin traktis kun spertarto (Mi dankas pro l' titolo, plej taŭga hemistiko lokebla plej facile en miaj aleksandroj) Aperis tamen grava ne nur la semantiko sed eĉ l' puntiliemo de iuj tradukantoj... **Mi famas kiel ega perversa pug-pinĉisto Fabelas tio, tial suferas mi de tristo.** («Le pince-fesses» ne ene de l' kantaro)



06

Ĝenataj estas foje franclingvaj tradukantoj
pro l' fakt' ke E-juĝistoj ne estas magistratoj,
ke pro arkaikiĝo de nun en Esperanto,
la vorto «kvarmanulo» aperas en debato,
eĉ pli, pri «rendevui»: franclingvo tiun verbon
ne havas, ĝi, pro tio, perturbas francan cerbon!
Najbara al la fonto verkiĝu la versio,
sed ŝajnamikojn oni forlasu, antaŭ ĉio
ĉar tion tre mirigus legantoj alilingvaj!...
(pardonu vi l' ŝajnrimojn en la ŝajnversoj sekvaj):
**Anstataŭ pafe celi al ŝajna malamiko,
prefere oni atendu ke iĝu li amiko!**
(« Les deux oncles » ne ene de l' kantaro)

07

Ŝanĝiĝas la debato kaj ties debatantoj
ne plu kanzonfakuloj, poetoj, versemuloj
sed nun asocioj kun tasko, la demandoj
pri indo de l' projekto, kun ties mon-postuloj.
Pretigas sin l' membraro, kun help' de bild-maketo
debati kaj baloti, kaj ĉio dank' al reto.
Aperis pri lipharo, kontesto pri detalo
ĉe la karikaturaj de l' trobadoro: formo,
« Duponta » laŭ desegnoj, « Duponda » laŭ realo.
(Al tiuj, kiam buboj, en la Hergé-a normo
ne banis, jen klarigo: ĉe nia kant-poeto
ĝi ŝlosas l' supran lipon en hara parentezo
sed pintas preskaŭ kiel stiril' de biciklo,
desegne) sed balote, influis ĝi sen pezo.
Sapera antaŭtuko, lipharo mia? Spit'!
Ricevu ĉi komparo pugbaton laŭ merit'.
(«La fessée» p.162 de l' kantaro¹)



(daŭrigota)

¹ La paĝnumeroj referencas al la libro eldonita de Espéranto-Gironde *Brassens en Espéranto*. (vidu p.7)

NI FUNEBRAS

La 30an de decembro atingis nin trista novaĵo:

Karaj geamikoj,

*Antaŭhieraŭ forpasis nia kara, fidela kompanino **Germaine Gatard**, kies centjariĝon ni kunfestis en januaro 2020.*

Funebra ceremonio okazos en la preĝejo St-Martin de Lormont merkredon la 5an de januaro 2022 je la 10a.

Triste

Marcelo

Esperanto-Gironde partoprenis en la 100jara festo honore al Germaine la 22an de januaro 2020. (vd en nro 161)

Mi perdis karan amikinin, fidelan al Esperanto kaj al siaj amikoj.

Ĉio estis dirita dum la centjariĝo, kiun ni festis en januaro 2020, sed triste mi ne plu aŭdos ŝian voĉon komentantan la aktualaĵojn, ĉar ŝia menso estis klara ĝis la fino. Lacega sed tute klarvidece ŝi volis foriri, estis ŝia deziro. Ŝi restos en mia memoro.

Monique



Mi eksciis malgajan novaĵon, la forpaso de **Thérèse CAYATTE**, ekslernantino mia kaj kiu gvidis kursojn por la infanoj en la lernejoj de Créon. Tio okazis la 4an de novembro, sed mi aŭdis pri tio nur antaŭ kelkaj tagoj.

Komence de la jaroj 2000, mi gvidis ĉiusemajnan Esperanto-kurson en Nansouty (kvartalo de Bordoza), ĉe Tereza. Ŝi loĝis en dometo, kiun bordozanoj nomas «échope», urba senetaĝa domo kun la strato unuflanke kaj fermita ĝardeneto aliflanke. La etoso estis varma kaj la kursoj okazis en la kuirejo, kio favoris festenemon. Krokodilado estis preteksto por ĝoje ridegi. Ŝia bonhumoro estis kontaĝa.

Ŝi estis gastigema kaj volonte invitis siajn najbarinojn ĉeesti la kurson: ŝi konis ĉiujn sur sia strato. Ŝi volonte gastigis la anojn de la asocioj, kie ŝi batalis: iufoje venis unu el ili, kun azeno kiel transportilo. Neeble parki ĝin sur la strato! Neniu problemo: ŝi metis ĝin en la ĝardenon, trairante... la koridoron!

Mi ĉiam memoros ŝian rideton kaj bonhumoron, kiam ŝi surprizis nin per vizito, kun amikino ankaŭ nomita Annie, dum la modesta aperitivo, kiun ni organizis okaze de nia geedziĝo, en la vicurbodomo de Pessac, la kastelo Cazalet. Same pri la surprizo per danco, kiun ŝi realigis por ni kun Aurora dum la festo, kiun ni faris la sekvontan someron por celebri tiun geedziĝon.

Poste, ŝi forlasis sian domon en Nansouty kaj transloĝiĝis en Créon, kie, kun Morine, ŝi siavice instruis Esperanton al la lernejoj geknaboj. Ŝi luktis kontraŭ malsano, sed ŝia vivĝojo dum niaj kunvenoj ne videbligis tion.

Ĝis revido Tereza!

Jean-Seb



Mi renkontis Thérèse dank' al la Esperanto-lecionoj de Jean-Seb. Li mem sciigis al mi la malgajan novaĵon pri ŝia morto. Ekde tiam mi pensas pri ŝi ĉiutage. Mi sopiras al Thérèse. Ŝi venis en mian vivon kaj en la Esperanto-klasojn, kiel torento de gajeco kaj lumo.

Por la geedziĝfesto de Annie kaj Jean-Seb, Thérèse kaj mi dancis sevilajn dancojn. Mi iris al ŝia domo por instrui la dancojn al ŝi: unue, ŝi malrapide lernis la paŝojn kaj, tuj poste, ni dancis laŭ ritmo de la muziko. Ŝi estis lerta pri dancado, festo kaj gajeco. Ŝi estis tre malavara. Ŝi estis ano de loka interŝanĝo-sistemo, la SEL. Ŝi bonvenigis homojn en sian hejmon kaj estis zorgema pri ĉiuj. Dum miaj vizitoj, mi vidis, kiom multe la najbaroj amas ŝin. Kiam ŝi estis moviĝonta, la najbaroj venis por montri sian tenerecon kaj diri al ŝi, ke ili treege sopiros ŝin.

Ŝi estis ekzempla pro sia kuraĝo. Malgraŭ malfacila vivo ekde infanaĝo markita de plenkreskula perforto, ŝia fido al la homaro estis neŝancel-ebla. Ŝi pardonis kaj pluiris, priatentis la nunan momenton, ĝuante la vivon intense, kaj zorgante pri la aliaj, kiel pri si mem. Konstante batalante por pli bona mondo, ŝi instruis Esperanton al infanoj, ĉar la lernado de la internacia lingvo estis unu el ŝiaj agadoj por harmonia kaj ĝoja estonteco por ĉiuj.

Thérèse, mi sopiras vin. Mi neniam forgesos vin.

Aurora



14an DE JULIO 1921
MORTKONDAMNO
de SACCO kaj VANZETTI

Laŭ la Cenona Kvinopo



N. Vanzetti

B.Sacco

Antaŭ 100 jaroj

La 14an de julio 1921 unuasentence Nicola Sacco kaj Bartolomeo Vanzetti estis mortkomdamnitaj en Dedham (Masaĉuseco). La 27an de aŭgusto 1927 ambaŭ ili estis elektroekzekutitaj en la malliberejo Ĉarlestono apud Bostono. Tiuj du eventoj levis protest-ondegojn tra la lando, eĉ tra la tuta mondo. Surstrataj manifestacioj, peticioj, telegramoj, artikoloj... Tra la popolamasoj flirtis kolektiva sento montranta, ke Sacco kaj Vanzetti enkarnigas ne nur la laboristan klason fronte al la "Kapitalo", sed ambaŭ ili reprezentas, konscie aŭ ne, sociojn kun gloraj pasintecoj, kies filoj estis devigataj ekziliĝi pro la perturboj de la jarcento. Kaj ilin Ameriko elĵetas post foruzado de iliaj laborfortoj. Krome laŭ multnombraj homoj, kiuj batalis unue por reviziado de la proceso kaj poste favore al forpardono, Sacco kaj Vanzetti frontlinie rolis en la batalo por la justo, la homaj rajtoj kaj la civilaj liberecoj, kontraŭ tiuj, kiuj regas je kia ajn kosto por sekura ordo kaj "konservinda identeco".

Kelkfoje asertoj konsideras la proceson de Sacco kaj Vanzetti kiel parodion de proceso kun jam antaŭdecidita verdikto. Ja, abundis tiam la neregulaĵoj, sed ĉefe la ekstera klimato forte premis sur la debaton. Hodiaŭ plu la justica eraro ne povas esti cent-procente pruvita. Sed tio ne malhelpas, ke la konvinkon de la ĵurianoj ŝajne nutris partecaj konkludoj de la instrukcio, la persona implikado de la juĝisto Thayer, kaj kelkaj dokumentoj, el la Buroo de la Enketoj, kiuj poste montriĝis malveraj. Krome antaŭjuĝo pri kulpeco pezis sur ambaŭ juĝitojn, simple ĉar ili estis italoj kaj anarkiistoj. Kaj ankaŭ aldoniĝis la misvaloro de la ekspertoj kaj de akuzaj atestoj.

Sacco kaj Vanzetti estis kondamnitaj laŭ malfidindaj konjektoj, kiuj verŝajne ne persistus antaŭ restudo de la afero, se la advokatoj de la du anarkiistoj sukcesus agnoski la diversajn demarŝojn por



reviziado de la proceso. Sed ĉiuj fiaskis kontraŭ obstina rifuzo de la juraj instancoj en Masaĉuseco, inkluzive tiun senditan al la Supera Kortumo de tiu ŝtato, malgraŭ la konfeso en novembro 1925 de dudek-trijara portugalo, Celestino Madeiros, mort-kondamnito pro murdo de kasisto, kiu konfesis, ke li mem parto-prenis en la atako, pri kiu estis kulpigitaj Sacco kaj Vanzetti, sed ili, ne.

Antaŭ 50 jaroj

Centoj da verkoj (poemoj, romanoj, filmoj, teatraĵoj, pentraĵoj, ktp) ankaŭ pruvadis engaĝiĝon de artistoj tra la mondo. Inter ili elstaras en 1971 la filmo *Sacco e Vanzetti* de Giuliano Montaldo kun la mondfama kanzono de Joan Baez, kiu aludas pri la ĉi-sekva interveno de Vanzetti.

Vanzetti kondamnita kun Sacco al elektroekzekuto respondis la 9an de aprilo 1927 al la juĝisto Thayer:

«Sen tiu afero mi estus travivanta oratorante ĉe stratanguloj antaŭ malŝatantaj homoj. Mi povus esti mortonta nekonata, ignorata fiaskulo. Nun ni ne estas fiaskuloj. Jen nia kariero kaj nia triumfo. Neniam en nia tuta vivo povus ni esperi fari tiom por toleremo, por justo, por reciproka kompreno inter homoj, kiel hodiaŭ ni nepropravole faras. Niaj vortoj, niaj vivoj, niaj suferoj - nenio! La forpreno de niaj vivoj, vivoj de bona ŝuisto kaj malriĉa fiŝkolportisto - ĉio! Tiu ĉi lasta momento estas nia, tiu agonio estas nia triumfo.»

Muziko de Ennio Moricone

Teksto de Joan Baez

Traduko de Miguel Gutiérrez Adúriz

LA BALADO de SACCO kaj VANZETTI

**Jen por vi, Nicola kaj Bart
restu ĉiam en nia kor',
nur via estas la fina hor'
el agoni' por via glor'**




Here's to you, Nicola and Bart
Rest forever here in our hearts
The last and final moment is yours
That agony is your triumph

*Maintenant Nicola et Bart
vous dormez au fond de nos cœurs
vous étiez tout seuls dans la mort
mais par elle vous vaincrez!*

Questo è per voi, Nicola e Bart
riposate per sempre nei nostri cuori
il momento ultimo e finale è vostro
quell'agonia è il vostro trionfo

あなた方に捧げる ニコラとバート
いつまでも私たちの心に残る
最後の時はあなた方の物
その苦しみはあなた方の勝利

Вот здесь вы, Никола и Барт
Оставляйтесь же навсегда в наших сердцах
Финальный момент ваш
Агония эта – ваш триумф



<https://lyricstranslate.com>

Marcelo

DE IU MARCELO AL ALIA...

La ellaborado de la libro *Brassens en Esperanto* naskas emociojn. Ekzemple, mi lastsemajne telefonis al Juliette Ternant por ricevi ŝian konsenton pri enŝovo de aranĝitajn tradukojn de ŝia forpasinta edzo, Marcelo T. Dum la diskuto ŝi elvokis broŝureton, kiun dekekzemplere ili mem eldonis, kaj Juliette bedaŭris, ke ŝian lastan, iu forprenis kun promeso je redono post kopio... sed ne redonis. Ankaŭ mi ricevis tiun broŝuron rekte de Marcelo, sed ankaŭ duan ekzempleron inter la postlasaĵoj de koramiko Johano-Luko Bergeon. Mi do vizitis mian sub-tegmentan E-trezorejon kaj el ĝi ĉerpis ekzempleron por sendi ĝin al Juliette. Mi tenis ambaŭ libretojn enmane, kiam defalis du folietoj. Antaŭ ol sendi ankaŭ ilin al Juliette, mi tajpis ilin:

Manskribita noto «Por J.L. Bergeon» de MT aldonita en lia broŝuro ***Senpretendaj versoj***.

Kara, ci rimarkos kelkajn erarojn de ritmo en tiuj rimaĵoj.

Danke al Levreaud, mi iom post iom lernis pri la reguloj (ili estas severaj) kaj miaj du lastaj estas pli «tolereblaj»...: 1887 kaj Alnreĝo

Saluton

MT

Kaj sur aparta folieto manskribita ĉi-poemo:

Alna reĝo – *Le roi des Aulnes*

Goethe – trad. Marcelo Ternant

manskribita aldono al liaj «*Senpretendaj versoj*»

Nu, kiu jen rajdas, tra nokto, tra vento?

- Ĝi estas la patro, en granda turmento,

li kuras al urbo kun via infano

ĉe-sine ĝin tenas per firma la mano.

«Fileto, pro kio vi tiel angoras?

- Aĥ, paĉjo, ĉu vi do Alnreĝon ignoras?

... Alnreĝon kun krono kaj roba trenaĵo...

- Ĝi estas ŝvebanta nebula restaĵo.

«Karega infano, vi ja senprokraste

por ludo belega alkuru nun haste

... la strandon invadis jam buntaj la floroj

kaj domon patrinan vestaĵoj el oroj.



Johan Wolfgang von Goethe

«... Aĥ paĉjo, paĉjeto, ĉu vi do ne aŭdas,
li kion promesas dum voĉo mallaŭtas
- Fileto serenu! trankvilu etulo!
... tra velkaj folioj... nur venta ululo...

«... Vin miaj filinoj alvokas espere,
al la farandolo vin logas vespere;
Vin ili atendas por danci por kaj kun
Ho ĉarma infano, vi venu kun mi nun!

«Paĉjeto rigardu! ĉe l' densa malhelo
Alnreĝajn filinojn kvazaŭ en fabelo...
- Infano, mi vidas kun tuta precizo
maljunajn salikojn kun branĉoj el grizo.

«Pro amo mi logis vin nur mildavorte,
ekde nun necesas vin rabi perforte!
- Ve, l' reĝo de l' alnoj min kaptis kun furor'
perforte, brutale min tiras de vi for...»

... Angore, la patro plutrudas rapidon,
li tenas firmege ĝemantan la idon,
atingas la celon, penege... kun vano!
Moliĝas la mano... Ĵus mortis l' infano...

Marcelo





VOJAĜO AL PIRENEOJ

Victor Hugo (1843)

Dum somero 1843, Victor Hugo inkognite vojaĝis kun sia amatino Juliette Drouet al Pireneoj kaj Hispanio¹. Ili interalie etapis en Bordoza. Jen eltiraĵoj el lia rakonto.



(daŭrigo)

La duobla fizionomio de Bordoza estas stranga; ĝin faris tempo kaj hazardo; necesas, ke la homoj ne difektu ĝin. Sed oni devas agnoski, ke la manio de «bone konstruitaj» stratoj, kiel oni diras, kaj de «belgustaj» konstruaĵoj pli kaj pli ĉiutage disvastiĝas kaj forviŝadas al la grundo la malnovan historian civiton. Alivorte, versajla Bordoza emas forvori antverpenan Bordozon.

La du ĉefaj preĝejoj de Bordoza, Saint-André kaj Saint-Michel, havas, anstataŭ sonorilturojn, kampanilojn izolitajn for de la ĉefa konstruaĵo, kiel en Venecio kaj Pizo.

La kampanilo de Saint-André, kiu estas la katedralo, estas sufiĉe bela turo, kies formo memorigas pri la Turo de la Butero de Rueno (Tour du Beurre de Rouen), kaj kiun oni nomas la Peyberland, laŭ la nomo de la ĉefepiskopo Pierre Berland, kiu vivis en 1430.

De Saint-André mi iris al Saint-Michel.

Mi ĵus eliris el la preĝejo, kiu estas el la dektria jarcento kaj ege rimarkinda, ĉefe pro siaj portaloj. Subite mi aŭdis je kelkaj paŝoj for: Sinjoro! sinjoro! Mi turniĝis kaj ekvidis en angulo de la korto, ĉe la pordo, vizaĝon de maljunulino aperantan je luko. Tiu luko, terure kaduka, vidigis la internon de mizerega ĉambro.

La maljunulinon apudis maljunulo.

Post kelksekunda pripenso mi donis al ili dek kvin soldojn. Ili tutsimple estis la gepordistoj de la tombejo.

¹: Victor Hugo, *Voyage aux Pyrénées*, Editions CAIRN, 2014

La pordistino diris al mi kun afabla rideto: Ĉu vi deziras vidi la karnejon?

Mi respondis: Kun plezuro, sinjorino. – Tion mi opiniis, respondis la maljunulino. Kaj ŝi aldonis: Vidu, jen la sonorilisto, kiu ĝin montros al vi. Ĝi estas tre bela.

La sonorilisto estis solida junulo ĉirkaŭ trideksesjara, masiva, fortika, grasa, roza kaj freŝa, tutŝajne vivĝojulo, kiel konvenas al tiu, kiu vivtenas sin dank' al la mortintoj. Miajn du fantomojn kompletigis vampiro.

La maljunulino min iel pompe prezentis al la sonorilisto: - Jen angla sinjoro, kiu deziras vidi la karnejon.

La vampiro senvorte puŝis la pordon de la turo kaj signis, ke mi sekvu lin. Mi eniris. Daŭre silenta, li refermis la pordon malantaŭ mi.

Ni tiam troviĝis en profunda mallumo. Tamen estis nokto-lampeto en la angulo de iu ŝtupo, malantaŭ dika pavimero. En la lumo de tiu lampeto, mi vidis la sonoriliston kurbiĝi kaj trafi lampon. Kun la lampo lumigita, li malsupren ekgrimpis la ŝtupojn de mallarĝa helica ŝtuparo, mi same agis.

Je iu momento la sonorilisto etendis sian dikan ostan manon al mi, mi sentis, ke niaj paŝoj resonas sur iu planko; ni estis en iu tre malluma loko, iaspeca obskura tombokelo.

Mi neniam forgesos tion, kion mi tiam vidis.

La sonorilisto, senvorta, senmova, staris meze de la kelo, apogita al fosto enbatita en la planko kaj, per sia maldekstra mano, li levis la lampon super sian kapon. Mi rigardis ĉirkaŭ ni. Nebula kaj difuza lumeto svage lumigis la kelon, mi distingis ties ogivan volbon.

Subite, fiksante miajn okulojn al la murego, mi vidis, ke ni ne estas solaj.

Strangaj figuroj, staraj kaj apogitaj al la muro, nin ĉiuflanke ĉirkaŭis. Je la lumo de la lampo, mi ilin konfuzo duonvidis trans tiu nebulo, kiu plenigas malsuprajn kaj tenebrajn lokojn.



Imagu cirklon el timigegaj vizaĝoj, en kies centro mi estis. Nigraĉaj kaj nudaj korpoj enprofundiĝis kaj perdiĝis en la nokto; tamen mi klare vidis eliĝi el la ombro kaj kliniĝi iel al mi, kunpremitaj unuj kontraŭ la aliaj, svarmon da sinistraj aŭ teruraj kapoj, kiuj ŝajnis alvoki min per grande malfermitaj buŝoj, sed sen voĉo, kaj kiuj min rigardis per orbitoj sen okuloj.

(daŭrigota)

Adaptis kaj esperantigis Janine

BORDOZA MUMIO SAVITA DANK' AL KATO

Les momies de BORDEAUX sauvées par un chat



Par Jean-Philippe Mortier Agence ADARC gazette "Petites Nouvelles de chats" Bx.

(daŭrigo)

Ĵurnalistoj, ĝustatempe avertitaj, informis pri la evento. Jam la morgaŭon en la gazeto la Bordozanoj miris pro nekutima foto: sur ĝi maljuna sed stamfanta virino estis ĉirkaŭata kaj suprenlevita de du ĝendarmoj. Unu el ili premis sub sia dua brako kapon de mumio kaj malantaŭ la triopo konkerpaŝe kvazaŭtriumfis kato!

Jes, ja! Ĵurnalistoj tie staris, tiel povis atesti kaj klarigi, kio okazis. Fakte la pordo de la tombokelo restis malfermita. Petolemaj infanoj profitis la okazon por enpenetri tien mateniĝe por ludi kaj ŝtelis unu mumikapon. Ili fajfis pri la postaj krioj de Ernestina, kiuj eĉ amuzis ilin. Ŝi estis fama en la tuta kvartalo pro sia bilda lingvaĵo. Ne plu sciante, kion fari per tiu nekutima objekto, ili subite pensis porti ĝin al la afrika bazaro kaj proponis ĝin kontraŭ kelkaj frankoj al la senagala vendisto. Ĉi lasta entute ignoris ĝian devenon, kaj lokis ĝin sur sia budo, esperante etan profiton.

Sed, kredu, gekaraj, ke tio povus bonorde okazi, se Victor, la kato, ne tiel ligiĝus al la mumioj kaj ties gardado. Ĝi sekvis ekde la komenco la iradon de la infanoj. Ne longis la vojo, ĉar la Mikaela bazaro situas nur kelkpaŝe de la tombokelo. Urbaj katoj tie abundas kaj neniu atentis pri ĝi. Ĝi instaligis sub la budo, kie estis lokita ĝia mumio kaj konscia pri siaj respondecoj, ĝi pensis, ke ĝisfine ĝi devas varti ĝin.

Post sia liberigo – ŝia arestado pro insult-ofendo nelonge daŭris, ankaŭ ne tiu de la senegalano pro neleĝa sed «nekonscia» posedo de sociaj valorajoj – Ernestina estis intervjuita de la ĵurnalistoj. Ŝi laŭdegis per superlativoj la profesiecon de sia kato Victor. Ĉi-lasta eĉ frontpaĝe aperis sur la gazeto.

Mi ne plu memoras, kiam ekzakte okazis tiu evento. Laŭ intervjuita historiisto, kiu raportis la eventon okaze de radioelsendo, eble tio okazis en 1969.


Epiloge por tiu okazintaĵo, sciuj, ke la bordozaj mumioj tre rapide diseriĝis pro la multnombraj vizitoj, kiuj multiĝis jaron post jaro. La Estraro de la Akvitanaj Antikvaĵoj decidis fine enterigi ilin en la tombejo La Chartreuse, kie aparta fosaĵo estis por ili specife aranĝita.

Ernestina, tre maljuna, forpasis iom post la «transloĝigo» de la mumioj. Legendo rakontas, ke ŝi postulis entombigon proksime al siaj kompanoj, por danki ilin pro partopreno en sia vivo.

Pri Victor, la kato, neniu scias, kiel ĝi postvivis. Multaj katoj libere, sovaĝe, trakuras la tombejon La Chartreuse. Fine, ĉu eblas pensi, ke inter ili katfantomo Victor de tempo al tempo revenas por varti sian kompanaron, atentante, ke ĉiuj milde dormas?

FINO

Teksto de Jean-Philippe Mortier tradukita de Marcelo



Wikipedia: Momies de Saint-Michel de Bordeaux

Google images: Momies de Bordeaux

<https://jeanphilippemortier.wordpress.com/2019/11/20/les-momies-de-bordeaux-sauvees-par-un-chat-2/>

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

**La venonta kunveno de Espéranto-Gironde okazos
DIMANĈON, LA 30an de JANUARO en PALMER je la 10a 30.**

